

U 19479 / 44 (1975)

Bulgara ESPERANTISTO



ENHAVO

* *	Inde renkonti la XI-an kongreson de BKP	1
* * *	Verda Tabulo de „Bulgara Esperantisto“	2
Dančo Dančev.	Nia festo. Kanto (versaĵoj)	3
* * *	Du nuntempaj popolkantoj. Traduko de Z. Dimitrova	3
* * *	Nova helpo al la patrinoj en Bulgario	3
* * *	Vazov-Tagoj en Karlovo	4
P. Galčavov.	En Silistra la E-movado reviviĝas	5
A. Kukuševa.	La E-lernoĵaro en Peŝtera	5
Stojko Boĵkov.	Prelego pri Finnlando	6
Imre Szenes.	Intervjuo kun Sándor Gáspár	6
S. Neilande.	Prelego pri Bulgario en Riga	9
* * *	La aŭstria prezidanto R. Kirchläger pri Esperanto	9
Grigorij Gercikov.	„Baseta maloldulo tristis dum humida primavero“	10
Benjamin Spock.	Tio estas tre kortuŝa por tiuj, kiuj venas el Usono	10
Violin Oljanov.	Iuj metodikaj demandoj de la E-instruado	12
Elin Pelin.	La malnova akvomuelejo. Tradukis Evgeni Vasilev	16
* * *	Humuraĵoj. Deziras korespondi	16
L. Bojaĝieva, V. Heimlich.	Al la arbaro! (kanto)	III

Sur la kovrilpaĝo:

Esperanto-kurso en Silistra. Meze — la gvidantino
Penka Kakalčeva (vidu paĝon 5)

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“ (Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci 32, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205 Bukureŝti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V—449

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**INDE RENKONTI LA XI-AN KONGRESON DE BKP**

La bulgara popolo alpaŝis al la lasta jaro de la Sesa Kvinjara Plano, kiu per sia rimarkinda ekonomia kaj socia programo, per sia skalo de supreniro en ĉiuj regionoj de nia socialisma disvolviĝo inspiras la laborpopolon, plivigligas ĝian energion kaj volon al konstruado. Kaj tio estas tute natura, ĉar en la libera krea laboro de la homo ĉe la socialismo la konkretaj faroj de la amasoj por realigo de la soci-ekonomia disvolviĝo de la lando estas tiu bazo, sur kiu estas konstruata la feliĉo kaj la bonfarto de la tuta popolo.

La ĉiuf flankaj sukcesoj de nia socialisma evoluo konkretiĝas en la rezultoj de la soci-ekonomia plano por 1974. La nacia enspezo — tiu ĉi plej sintezita indekso de nia ekonomia disvolviĝo — kreskis per 7,5%. En la jaro 1974 la industria produktaĵo kreskis per 8,5%. Kun stabilaj kaj altaj ritmoj, nekonataj al la kapitalismaj landoj, plue evoluas ankaŭ la ceteraj branĉoj de nia socialisma ekonomio. Komenciĝis la ekspluatado de pli ol 2000 grandaj objektoj, kiel la Atomcentralo apud Kozloduj, la magistrala gasdukto USSR — Bulgario, la akvoenergia kaskado „Belmeken — Sestrimo“, vicoj da grandaj entreprenoj de la maŝinkonstruado, kemio, malpeza kaj nutra industrioj.

La atingitaj sukcesoj en 1974 — jaro de la krea laboro de la bulgara popolo — pruvas la korektecon de la konsekvenca linio de konstruado de matura socialisma socio en nia lando. En la fundamento de tiuj sukcesoj kuŝas la helpo kaj la kunlaborado de Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj.

La sukceso en la ekonomio kreis kondiĉojn por plialtigo de la realaj enspezoj de la loĝantaro en 1974 per 5%. Kreskis la varspezo per 9,5%. Novajn sukcesojn atingis la bulgara scienco, kulturo, arto.

Ĉiuj ĉi atingoj kiel dum 1974, tiel same dum la forpasintaj kvar jaroj de la Sesa Kvinjara Laborplano montras la vivkapablecon de nia sociordo, ĝian altan humanecon, montras, ke la socialisma konstruado ĉe ni, ligita kun la feliĉo kaj bonfarto de la laborhomoj, estas inda ekzemplo de nia lando por la tuta mondo.



Nun nia popolo vivas kun la zorgo plenumi la planon por 1975 — la lasta kaj decida jaro de la Sesa Kvinjara Laborplano. Por 1975 oni antaŭvidas plialtigi la nacian enspezon per 9%, la amplekson de la industria produktaĵo per 8%, de la agrikulturo — per 9,3%, de la varspezo — per 7%, de la realaj enspezoj de la laborhomoj — per 4,5%.

Tio estas grandaj respondecaj kaj noblaj taskoj, kies plenumo postulas decide forigi la malperfektaĵojn, pli bone uzi la eblecojn de nia ekonomio, de niaj rezervoj en ĉiuj agadsferoj, postulas, ke per nova forto ekfloru la iniciatemo kaj la kreado de la popolamasoj.

Responde al la Alvoko de CK de la Bulgara Komunista Partio al ĉiuj civitanoj de nia lando plue disvolvi la batalon por realigo de la decidoj de la Deka Kongreso de BKP kaj por inda renkonto de ĝia XI-a Kongreso, en la tuta lando ekbolis grandega organiza kaj politika agado. Ĝi esprimiĝis en la promesoj, kiujn la laborkolektivoj donas por plenumo kaj superplenumo de la Plano por la tuta Jarkvino.

Akceptinte la Alvokon de la Partio kiel stan propran aferon, hodiaŭ la laborkolektivoj starigis antaŭ si la taskon plue altigi la socian produktivecon de la laboro, batali por ŝparema uzado de krudmaterialoj kaj elektroenergio, por novaj sukcesoj en ĉiuj regionoj de la ekonomia, socia kaj kultura vivo.

La Alvoko de CK de BKP postulas novan kreon agadon ankaŭ de la bulgaraj esperantistoj — ardaj patriotoj kaj internaciistoj, entuziasmaj konstruantoj de matura socialisma socio en nia Patrolando. Ĝi invitas ilin al novaj kuraĝaj faroj sur la kampo de nobla laboro por la bono kaj la feliĉo de nia popolo.



VERDA TABULO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

En la abonkampanjo de nia organo por 1975 ĝis nun plej bonajn rezultojn atingis:

1. EMIL ĈIRPANSKI — prezidanto de Esperanto-Societo „Fajrero“ en u. Dospat — 61 abonojn;

2. VELURINA ĈIRPANSKA — sekretariino de la sama societo — 60 abonojn;

3. ATANAS ŜOPOV — membro de la estraro de la sama societo — 60 abonojn.

Sume E-Societo „Fajrero“ en Dospat, distrikto de Smoljan, kolektis 181 abonojn kaj per tio ĝis nun okupis la unuan lokon inter la E-societoj en la lando.

Ni salutas la estraron de E-Societo „Fajrero“ kaj ĝiajn aktivulojn pro ilia ekzemplodona agado!

Geesperantistoj el la tuta lando, sekvu ilian ekzemplon! Abonu! Abonigu! Plenumu vian E-devon!

*Monsumojn sendu per poŝtmandato rekte al la asocia kancelario.
NI NEPRE ATINGU 5000!*

Venas la mateno blua
kaj ekbrilas ora sun',
venas festo — la unua
inter niaj festoj nun.

Rememoroj kun ĝi venas
pri batalo kaj sufer'.
Kore la popolo benas
batalantojn por liber'.

Venas nia festo glora,
hele bluas la ĉiel'.
Ĉie ŝprucas amo kora.
Vivo iĝas jam fabel'
sub la lum' de l' suno ora
ni marŝadas sen ŝancel'.

KANTO

Blua patruja ĉielo,
milda kanteto kaj flor'.
En la animo — fidelo,
amo sincera — en kor',
Estas en mondo unika
vi, mia rondo amika!

Birdo argenta kaj nubo,
pluvo printempa kaj mar',
kredo fortika, maldubo
vivas en mia sang', ĉar
estas en mondo unika
vi, mia rondo amika!

Floroj kaj fruktoarbaroj,
suno, plenakva river',
lando kun sanktaj altaroj,
suda Balkana vesper'.
Estas en mondo unika
vi, mia rondo amika!

*La versaĵoj „Nia festo“ kaj „Kanto“ ricevis III-an premion por originala poezio en la Jubilea Konkurso de „Bulgara Esperantisto“ 1974.

1975 — Internacia Jaro de la Virino

NOVA HELPO AL LA PATRINOJ EN BULGARIO

Jam en la komenco de 1975 — la Internacia Jaro de la Virino — CK de la Bulgara Komunista Partio kaj la Registaro de Popola Respubliko Bulgario eldonis dekreton, kiu antaŭvidas novan helpon al la patrinoj, naskantaj infanojn.

Ekde la 1 de januaro 1975 patrino, kiu naskos vivan infanon, ricevos unufojan monhelpon de 100 levoj (anst. 20, kiel ĝis nun) — por la unua infano, 250 lv.

Poezio kaj beletrio

Du nuntempaj popolkantoj

MINISTA*

Mi volas, panjo, mi volas
ministon, panjo, ekami,
ministon sveltan kaj lertan,
kun lampo super la frunto.
Hieraŭ, panjo, mi pasis
preter ministra brigado.
Inter ministoj kunuloj
mi vidis mian karulon.
Forte li svingis pioĉon,
nigrajn tavolojn disbatis,
nigran ŝtonkarbon disrompis,
duoblan normon plenumis.
Se li fariĝos sturmulo
mi prenos lin kiel edzon.

TRAKTORISTINO

Jam en matena krepusko
unua juna Damjana
traktoron sian direktis,
plugadon novan komencis.
Traktoro kantas, parolas,
sonore kantas Damjana,
al sia patro dirante:
„Rigardu, paĉjo, rigardu
ĉi tiun kampon senliman,
tiun bienon popolan!
Rigardu, paĉjo, rigardu --
popolo tuta kunvenis,
junuloj kaj plenaĝuloj.“

El bulgara: Zefira Dimitrova

* „Minista“ kaj „Traktoristino“ ricevis III-an premion por tradukita poezio en la Konkurso de „Bulgara Esperantisto“ 1974.

(anst. 200)—por la dua, 500 lv. (kiel ĝis nun)—por la tria, 100 lv. (anst. 20)—por la kvara kaj por ĉiu sekvanta infano.

Patrino, kiu studas regule en lernejo, ricevos monate 80 lv. ekde la komenco de la lernojaro ĝis la aĝo 8 monatoj kaj duono — por la unua infano, 10 monatoj kaj duono — por la dua, 12 monatoj kaj duono — por la tria kaj 8 monatoj kaj duono — por ĉiu sekvanta infano.

ORGANIZA VIVO

VAZOV-TAGOJ EN KARLOVO

8—15 de julio 1975

Lige kun la 125-a datreveno ekde la naskiĝo de la granda bulgara verkisto-klasikulo Ivan Vazov (1850—1921), en u. Karlovo, situanta en la pitoreska Roza Valo, okazos Internacia Esperanto-Seminario kaj Nacia Esperanto-Recitalo.

INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO, 8—15 de julio

LEKTOROJ: eminentaj sciencistoj kaj la partoprenantoj mem.

EN LA PROGRAMO: interkona vespero, adiaŭa balo-bankedo, renkontiĝo kun la loka E-junularo, amuzaj kaj artaj vesperoj, partopreno en la Nacia E-Recitalo ktp.

EKSKURSOJ: tuttaga kaj duontaga; partopreno en la naciaj solenaĵoj en Sopot — la naskiĝloko de Vazov.

FILATELA EKSPozICIO: la dezirantoj partopreni adresu sin al la Organiza Komitato.

KOTIZOJ (en bulgaraj levoj): trifoja manĝado tage, ekskursoj, partopreno en ĉiuj aranĝoj (balo-bankedo, seminario, recitalo k. a.), ricevo de ĉiuj seminarioj materialoj. La diferenco

inter la kotizoj rilatas nur al la loĝejo (kategorio A — en hotelo de „Balkanturist“, B — en hotelo, C — en hotelo, komunloĝejo aŭ turista dormejo kun pli ol du litoj en la ĉambro). Eksterlandanoj — nur en „Balkanturist.“

limdato de pago:	A	B	C	eksterlandanoj
Ĉis la 30 de marto:	46	42	40	64
ĝis la 30 de majo:	50	46	44	70
ĝis la 20 de junio:	55	50	48	76

Bulgara esperantisto povas inviti sian eksterlandan amikon, pagante la kotizon, fiksitan por eksterlandanoj, kaj siatempe informante la Organizan Komitaton pri tio.

XII NACIA ESPERANTO-RECITALO, 12—15 de julio

PARTOPRENI POVAS: ĉiu organizita membro de BEA — individue aŭ en kolektivo, sendepende de la aĝo.

ĜENROJ: recitado, muntaĵoj, teatro, estrado, folkloraj aranĝoj (sen apartaj dancensembloj), kanthoroj, individuaj plenumantoj k. a.

TEMARO: la verkaro de Vazov, la heroa pasinteco de la bulgara popolo, la 30-jariĝo de la venko super la faŝismo kaj hitlerismo, la batalo por paco, la Internacia Jaro de la Virino, aktualaj problemoj de la nuntempo k. a.

KOTIZOJ (en levoj): loĝado dum tri tagoj (12—14 de julio), aliĝo, partopreno en la aranĝoj de la Recitalo, en la junulara balo. La kotizoj ne inkluzivas la ekskursojn (kiuj okazos la 13-an de julio) kaj la manĝadon. Kiuj deziras ricevi ankaŭ nutraĵon, devas aldoni 8 levojn al la fiksitaj kotizoj. La kategorioj por loĝado estas kiel por la seminario — A, B, C. Por junpioniroj kaj lernantoj

estas rabato.

	Junpioniroj			Lernantoj			Aliaj		
	A	B	C	A	B	C	A	B	C
Ĉis la 30. III:	6,50	5	3,50	7	5,50	4	8	6	4,50
ĝis la 30. V:	8,50	6,50	5	9	7,50	6	11	9	7
ĝis la 30. VI:	14	9	8	15	12	10	16	14	12

Pro limigita kvanto de lokoj aliĝoj post la 20 de junio ne estos akceptataj.

Kotizojn sendu al adreso: Bulgario, 4300 Karlovo, D. S. Kasa, smetka 185/617 — Esperanta Seminario-Recitalo.

Leterojn sendu al adreso: Bulgario, 4300 Karlovo, Car Asen 7, inĝ. Boĵidar Leonov (tel. 39—33).

Samideanoj, partoprenu amase la Vazov-Tagojn en Karlovo! Preparu vin akurate por la Nacia Recitalo! Aliĝu siatempe por ĝui rabaton kaj certigi vian nepran partoprenon en tiuj gravaj kaj interesaj aranĝoj!

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris per alta ordeno „9 de septembro 1944 jaro“ — I grado k-don NANO VUTOV NANOV — prezidanto de la Sofla Urba Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“, lige kun lia 70-jariĝo pro lia aktiva batalo kontraŭ la faŝismo kaj partopreno en la konstruado de la socialismo en nia lando.



KONKURSOJ POR LA VAZOV-TAGOJ

1. **KONKURSO DE REFERAĴOJ** — pri la verkaro de Ivan Vazov.

2. **LITERATURA KONKURSO** — originalaj verkoj pri Vazov kaj tradukoj de liaj verkoj en Esperanton.

La materialoj por tiuj du konkursoj devas atingi la Organizan Komitaton ne pli malfrue ol la 31 de majo 1975. La plej bonajn konkursaĵojn oni tralegos dum la seminarioj tagoj. Ĉiu partoprenanto en ambaŭ konkursoj ricevos premion. La plej bona konkursaĵo estos premiita per senpaga partopreno en la Seminario.

La materialoj devas esti prezentitaj en minimume 2 ekzempleroj, tajpitaj. Rajtas partopreni ĉiu esperantisto.

3. **KONKURSO: KION VI SCIAS PRI IVAN VAZOV?**

Rajtas partopreni nur eksterlandaj esperantistoj, respondante almenaŭ al unu el jenaj

demandoj:

1. Kiam kaj kie naskiĝis Ivan Vazov? Kion ĝenerale vi scias pri lia verkaro?

2. Kiu estas la plej fama verko de Ivan Vazov?

3. Kiuj el la verkoj de Vazov estas tradukitaj en via lando kaj kiam?

4. Kiu verko de Vazov plej multe plaĉas al vi? Kial?

5. Kiuj verkoj de Vazov estas tradukitaj en Esperanton?

La respondoj devas atingi la Organizan Komitaton ne pli malfrue ol la 30 de majo. La plej bonaj respondoj estos premiitaj.

Pliaj informoj pri la 3 konkursoj vi povas ricevi de la Organiza Komitato, adreso: Bulgario, 4300 Karlovo, Car Asen 7, ing. Bojidar Leonov.

EN SILISTRA LA E-MOVADO REVIVIĜAS

Komence de lernojar 1974—1975 la Esperanto-afero en urbo Silistra reviviĝis dank' al la fervora esperantistino Penka Kakalčeva — instruistino de germana lingvo en la Instituto de Instruistoj.

Ekde sia alveno la juna kamaradino organizis kaj jam gvidas regule du kursojn de Esperanto: unu por studentoj, alian por lernantoj. Ambaŭ kursoj funkcias tre bone. Inter la junularo regas granda intereso al Esperanto.

La 15-an de decembro la junaj esperantistoj celebris solene la naskiĝtagon de Zamenhof. Raporton pri lia vivo kaj afero tralegis en Esperanto Kakalčeva. Sekvis varia esperantlingva belarta programo de junaj esperantistoj.

P. Galčarov

ESPERANTO-KURSOJ

Blagoevgrad. La loka Esperanto-societo malfermis la 3-an de decembro 1974 kurson kun 18 partoprenantoj. Gvidas ĝin Ana Angelova — instruistino.

Svoĝe. E-kurso estas malfermita la 3-an de januaro. Ĝi estas komuna aranĝo de la loka E-societo kaj la popola legejo. La kurson gvidas Elena Radenkova — bibliotekistino. Partoprenas 14 personoj.

Kostenec. En la urbo funkcias kurso, organizita de la loka E-societo. Ĝin partoprenas 12 kursanoj.

LA E-LERNOJARO EN PEŜTERA

La E-lernojar 1974/75 en Peŝtera komenciĝis ĝustatempe kaj estis bone organizita. La estraro de la E-Societo „Nova Epoko“ kune kun la estraro de la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco en la urbo faris unumonatan afiŝan kaj radiopropagandon. Por la propagando helpis la bona jubilea E-ekspozicio „La paco — afero de ĉiuj“ el materialoj, kolektitaj el la tuta mondo. Ni aranĝis E-kurson en la agrikultura teknikumo por la 15-a fojo. Tie jam 15 jarojn instruas la instruisto-agronomo Ŝterjo Kukuŝev, kiu gvidas ankaŭ la Junularan E-rondon „Georgi Dimitrov“.

La dua E-kurso por 15 civitanoj komenciĝis en la bela lingva kabineto de la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco.

A. Kukuŝeva

✦ *Aktive laboras la junpionira Esperanto-taĉmento en u. Madan ligante sian agadon kun la tuteca vivo de la junpionira organizaĵo. Sur la foto: E-programo sur la scenejo de la Junpionira Domo „Metaksa Guginski“.*



PRELEGO PRI FINNLANDO

En la domo de E-Societo „Radio“ en Pazar-
gik okazis kunveno, dediĉita al Finnlando.
Prelegis Ŝterju Kukuŝev — instruisto el urbo
Peŝtera. La preleganto rakontis interese siajn
impresojn pri la socia, politika kaj kultura
vivo en tiu lando, pri la kutimoj de la pacama
finna popolo, pri la gastamo de la finnaj espe-
rantistoj. La prelego estis ilustrita per koloraj
diapozitivaj kaj popolmuziko, aŭdigita per mag-
netofono.

La kunveno tre bone sukcesis. Partoprenis
ankaŭ esperantistoj el la distrikto.

Stojko Bojkov

En majo 1975 nia E-Societo „Vekiĝo“ en
Ŝumen celebros la 70-an datrevenon de sia
fondiĝo. Okaze de tio je la fino de aprilo ni
aranĝos letervesperon kaj en majo — gran-
dan publikan ekspozicion. Por varbaj
celoj ni ĝentile petas la samideanojn el
ĉiuj landoj sendi al ni gazetojn, broŝurojn,
faldfoliojn, salutleterojn, bildkartojn kaj
aliajn esperantaĵojn.

Iujn senditaĵojn ni volonte povus resendi.

Ĉiu kontribuinto ricevus minimume bild-
karton kun informo pri la solenaĵo. Eks-
terlandaj esperantistoj, vizitantaj tiutempe
Bulgarion, povus gastigi al ni.

ADRESO: *Bulgario, 9700 — Ŝumen,*
p. k. 60, Esperanto-Societo „Vekiĝo“.

TRA LA E★ MONDO

INTERVJUO KUN SÁNDOR GÁSPÁR

*ĉefsekretario de la Landa Konsilio
de la Sindikatoj en Hungario*

La konataj gazetoj „Hungara Vivo“ kaj „Esperanto Magazin“ petis intervjuon de Sán-
dor Gáspár — membro de la Politika Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio,
ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj kaj gvidanta persono en la internacia
sindikata movado.

La intervjuo aperis en № 5/1974 de „Hungara vivo“. Ĉi sube ni donas ĝin:

— *Kiel vi vidas la lingvajn malfacilaĵojn en la sindikata mondmovado kaj interne de ĝi en la hungaraj sindikatoj?*

— La hungara sindikata movado havas tre vastajn internaciajn interrilatojn kun la landaj pintorganizaĵoj kaj ankaŭ kun iliaj metiaj, uzinaj organizaĵoj — komencis sian respondon Sándor Gáspár.

Tiuj interrilatoj pli kaj pli intensiĝas. La sindikatojn de la socialismaj landoj interesas inter alie la metodoj de nia agado. Kun vigla atento observadas nian movadon ankaŭ la sindikatoj de la kapitalismaj landoj, eĉ pli la tieaj laboristoj; ĉi tiuj, ĉe renkontoj kaj aliaj kontaktigoj, deziras informiĝi pri tio, kiel ni solvis multajn problemojn ĉe ili ekzistantajn. La sindikatojn de la evoluantaj landoj interesas precipe tio, kian lokon kaj rolon en la socio havas la hungaraj sindikatoj kaj kiajn rezultojn ili atingis en la socialisma konstruado.

Tia atento nin honoras kaj ni klopodas kontentigi la interesigon en la signo de la internacia laborista solidareco. La sindikatanoj, postenuloj, delegitoj estas ĉe ni ĝoje akceptataj gastoj. Ni provizas ilin ankaŭ per niaj fremdlingvaj sindikataj eldonaĵoj. Niaj personaj interparoloj kaj traktadoj okazas helpe de interpretistoj; tio, kompreneble, malfaciligas en certa mezuro la reciprokan komprenon, ekzistas do lingva problemoj.

Niaj sindikataj gvidantoj kaj aktivuloj kaj ankaŭ niaj membroj iradas en la mondo diversloke, kaj akiras spertojn pri la laboro kaj bataloj de la eksterlandaj sindikatoj. Tial ankaŭ kun la sindikatoj de la kapitalismaj landoj ni deziras evoluigi la interrilatojn. Mi esperas kaj opinias verŝajna, ke en la estonteco tiuj interrilatoj estos pli kaj pli multflankaj, kaj krom la kulturaj, sportaj kaj aliaj terenoj ili eten-



diĝos al multaj gravaj problemoj de la movado.

Estas evidente, ke la lingva izoliteco efikas malhelpo al la internaciaj interrilatoj. Estus do bone malpliigi la lingvajn malfacilaĵojn, por ke ni pli bone ekkonu kaj komprenu unuj la aliajn. Niaj celoj kaj taskoj estas ja de komuna intereso. Tial ni salutas kaj laŭ niaj ebloj ankaŭ subtenas Esperanton, kiu servas la pliintensigon de la internaciaj rilatoj, kaj ni subtenas ankaŭ la E-movadon.

Laŭ mia opinio Esperanto povus havi signifan rolon en la pli bona konigo de la vivo kaj sindikata movado de la diverslingvaj laboristoj. Ĝi povus grave helpi en tio, ke la lingvoproblemo estu malpli embarasa kaj fine estu solvita. Ĉi tio ĉiamaniere estas intereso de ĉiuj sindikatoj en la mondo, pri kia ajn landa sindikata movado temas.

—Ni ĝojas, ke kamarado Găspăr tiel pritaksas E-ton. Tial mi parolos ankaŭ pri aliaj lingvaj problemoj sindikato-koncernaj. Plilarĝigis la internacia laborista turismo kaj la internaciaj fertaj ripozoj, organizataj de la sindikatoj,

Kreskas la nombro ankaŭ de tiuj faklaboristoj, kiuj okaze de eksportaj mendoj aŭ kunlaboroj laboras eksterlande dum pli-malpli longa tempo. Ankoraŭ pli nombraj estas la laboristoj kun ili laborantaj en la akceptantaj landoj. Por la laboristoj de la evoluantaj landoj tia kunlaboro signifas ankaŭ fakan aŭ perfektigan kurson. Sed oni ne povas starigi interpretiston apud ĉiun eksterlandan muntiston! Ĉu kamarado Găspăr ne pensas, ke la internacia sindikata movado devas okupiĝi ankaŭ pri ĉi tiu problemo? Kaj ĉu oni ne devus rekomendi al la laboristoj, laŭ internacia interkonsento de la sindikatoj, ĝuste la plei facilan lingvon, Esperanton? Kia estas via opinio pri ĉi tiu eblo?

—Kiel tutmonde, ankaŭ ĉe ni, unu el

la noblaj celoj de la sindikata movado estas plilarĝigi la internaciajn rilatojn sur sindikata tereno, per sindikataj rimedoj. Ĉion, kio tion helpas — kaj mia konvinkigo estas, ke Esperanton tion helpas — ni subtenas laŭ niaj fortoj. Mi opinias preskaŭ certa, ke tiu propono, ke la sindikatoj helpu la lernon de Esperanto per internacia interkonsento kaj rekomendo, trovus aprobon ĉe la sindikatanoj kaj sindikata movado de multaj landoj kaj ankaŭ ĉe la internacia korporacio de la sindikatoj.

Tial ni estas pretaj kunlabori kun tiuj sindikatoj, laŭ kiuj Esperanto plifaciligus la interproksimiĝon, interkompreniĝon de la diverslandaj sindikatoj kaj sindikatanoj. Por tio, en konvena tempo, sur la internaciaj forumoj de la sindikatoj ni ankaŭ proponus pridiskuti ĉi tiun gravan problemon kaj se ni atingos konsenton, fari ankaŭ rezolucion por la disvastigo de Esperanto inter la sindikatanoj laboristoj.

—Ĉi tiuj gravaj kaj esperigaj konstatoj de kamarado Găspăr do signifas, ke la Landa Konsilio de Sindikatoj turnus sin post la necesa preparado al la Sindikata Mondligo kun la propono, ke oni metu al tagordo ĉi tiun gravan internacistan demandon?

—Jes. Mi pensas, ke la hungaraj sindikatoj, en kovenata tempo, esprimus ĉe la Sindikata Mondligo, ke ili rigardas Esperanton kiel utilan lingvan helpon por reciproka interkonigo, por interŝanĝo de spertoj, por interproksimiĝo, por evoluigo de la interrilatoj. Tial ni proponus konvenan pritraktadon de la afero.

Estas nature, ke la sindikatoj kaj la sindikataj ligoj havas suverenan rajton difini sian starpunkton. Kaj tiun rajton ni devas respekti.

—La suverenaj rajtoj estas evidentaj. Sed dum ĉiu internacia pritraktado okazas diskutoj. Oni devus, niaopinie, ankaŭ diskuti kun la eventualaj kontraŭargumentoj. Ekzemple menci — ĉar pravi ne necesas, ke la

grandega plimulto de la laboristoj-
snidikatanoj de la mondo neniam, ne-
nie lernos iun ajn fremdan nacian
lingvon. Tamen granda parto el ili
volonte lernos tian facilan lingvon
kel *Esperanto*, sed nur tiam, se in-
ternacia konsento de la sindikatoj
garantiis, ke en la landoj de la in-
terkonsentintaj sindikatoj grandme-
zure kreskus la tendaro de la *Espe-
ranto-parolantoj*, do plilarĝiĝus la
multflanka utiligebleco de la lingvo.

— Por ĉiu bona afero ni estas pre-
taj diskuti sur ĉiu nivelo de niaj in-
ternaciaj renkontiĝoj. La situacio fakte
estas tia, ke granda plimulto de labo-
ristoj, aktivuloj kaj ĝenerale de la
popoloj neniam alproprigos lingvon de
iu ajn alia nacio. Ankaŭ tio estas
fakto, ke eĉ la sindikatestroj, parolan-
taj unu aŭ du fremdajn lingvojn,
ofte bezonas interpretistojn, ĉar multaj
el iliaj partneroj komprenas iun alian
fremdan lingvon.

— *Jen kies rekono kontribuis al
tio, ke UEA en 1966 sin turnis al
UNO kun internacia memorando, ap-
robita el 74 landoj. Tiam, krom unu
miliono da individuaj subskribintoj,
inter ili multaj konataj politikistoj,
scienculoj, artistoj, protektis la me-
morandon la gvidantaro de 3843 di-
versaj sociaj organizoj en la nomo de
sume 71 milionoj da membroj. Kvankam
ne atinginte sian celon, la memorando
tamen estis signifa, precipe ĉar ĝin
subskribis 25 grandaj naciaj kaj
internaciaj sindikataj centroj de so-
cialismaj kaj kapitalismaj landoj kun
preskaŭ 25 milionoj da membroj, ap-
robante, ke E-ton kiel UNO-konven-
cian internacian lingvon devige oni
instruigu en ĉiuj lernejoj de la mondo
kaj progresive ĝin enkonduku sur ĉiu
kampo de la internaciaj rilatoj. La
plimulto de tiuj sindikatoj apartenas
al la Internacia Ligo de Liberaj Sin-
dikatoj. Ni opinias do, ke se laŭ hun-
gara iniciato la Sindikata Mondligo
farus decidon pozitivan, tiam oni po-*

*vus komenci intertraktadon ankaŭ
kun la Internacia Ligo de Liberaj
Sindikatoj. Kiajn ŝancojn kamarado
Gáspár vidas ĉi-koncerne?*

— Kompreneble, mi ĝojus, se en
la Mondligo de Sindikatoj ni sukcesus
en ĉi tiu demando kaj se la Mondligo
de Sindikatoj povus pri ĝi sukcese in-
tertrakti kun la Internacia Ligo de Liberaj
Sindikatoj. Kelka dialogo jam komenciĝis
inter ĉi tiuj du grandaj internaciaj ligoj.
Precipe pro tio, ke la sindikatestroj en
la kapitalismaj landoj pli kaj pli trovas
necese krei interrilatojn ankaŭ kun la
sindikatoj de la socialismaj landoj.

Ĉi tiun interproksimiĝon ni sincere sa-
lutas kaj, por la multflanka evoluigo de
niaj interrilatoj, ni povus kunlabori an-
kaŭ en la larĝsfera disvastigo de *Espe-
ranto*. Estus do dezirinde, ke ankaŭ
la Mondligo de Sindikatoj kaj la In-
ternacia Ligo de Liberaj Sindikatoj faru
ĉi-koncerne interkonsenton. Tamen, mi
pensas, ke antaŭe UEA povus iniciati
ĉe la internaciaj sindikataj centroj, ke
ili okupiĝu favore pri *Esperanto*. Kaj
poste ni, hungaraj sindikatoj, pritraktin-
te la aferon ankaŭ kun la sindikat-
organizaĵoj de aliaj landoj, povus akceli
la suk, ceson de la iniciato. Depende
de ĉi tio povus sekvi unuecigo de la
planoj kajdifino de la prakti kaj taskoj.

— *Mi opinias la vidpunkton de ka-
marado Gáspár tre reala.*

*Fine, permesu ankoraŭ mallongan
demon. La „Népszava“, la ĵur-
nalo de la hungaraj sindikatoj, en sia
numero de 12-a de majo publikigis
artikolon, kiu konstatis interalie, ke
la ellerno de Esperanto povus esti
utila kultura engaĝiĝo, ag-ofero por
la anoj de la socialismaj laborbri-
gadoj. Kion vi opinias pri tio?*

— Mi konsentas. Estas certe, ke
anoj de socialismaj brigadoj, ellerninte
Esperanton, jam per la lingvolernado
pligrandigus sian kulturitecon kaj povus
ligi amikajn, korespondajn rilatojn kun
samfakaj brigadanoj de iu socialisma
lando, lernantaj aŭ jam sciantaj *Espe-*



ranton. Per tio la internacia amikeco kaj la internaciismo fariĝus por ili kvazaŭ persona travivaĵo.

—Ni dankas la grandsignifan deklaron de k-do Gáspár. Ni venigos ĝin al la naciaj kaj internaciaj asocioj de la E-movado kaj al ties ĉiuj gazetoj kaj radio-dissendejoj, por ke ili uti-

ligu ĝin en la intereso de la grandioza internaciisma afero ĉe la sindikataj centroj de sia propra lando kaj sur ties forumoj internaciaj.

— Pluajn sukcesojn mi deziras al via fervora laboro por la disvastigo de Esperanto — diris fine Sándor Gáspár.
Imre Szenes

ALVOKO DE LA REDAKCIO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

Ni opinias, ke la bulgaraj esperantistoj devas vaste utiligi la intervuon de tia elstara hungara kaj internacia sindikata aganto, kia estas kamarado Sándor Gáspár. Tial oni traduku ĝin bulgarlingven kaj prezentu la tradukon al la redakcioj de lokaj ĵurnaloj kaj radioretoj, konigu ĝin al ĉiuj esperantistoj kaj al neesperantista publiko, por ke la favora rilato kaj deklaro de k-do Gáspár fariĝu vaste populara kaj helpu ankaŭ nian E-laboron.

Samtempe ni petas niajn legantojn sendi salutleterojn al kamarado Gáspár, subskribante sin per plena nomo kaj indikante sian adreson kaj profesion. Kompreneble, oni ne menciui ĉi-nian peton! La leteroj estu adresataj jene: Gáspár Sándor, a Magyar Szakszervezetek, Országos Tanácsának főtthkára, H—1415, Budapest, VI, Dozsa György ut. 84/b, Magyarország—Hungario.

PRELEGO PRI BULGARIO EN RIGA

En la E-klubo de Riga jam fariĝis tradicio, ke post la somera ripozperiodo oni raportu pri siaj vojaĝoj helpate de koloraj diapozitivoj. En 1974 nia klubanino Aina Silkalne en turista grupo vizitis Bulgarijon. Reveninte ŝi montris diapozitivojn, kolorajn bildkartojn kaj alian materialon pri diversaj bulgaraj urboj. Ŝia interesa prelego kune kun la aldonita materialo konatigis la ĉeestantojn kun la bulgara ĉefurbo Sofio, kun la pitoreska Veliko Tŕnovo, kun la legendoj kaj ŝercoj pri Gab-

rovo, memorigis al ni la heroecan bulgaran pasintecon, montrante la monumenton de Ŝipka kaj la fame konatan monumenton de Aljoŝa en Plovdiv.

La prelego de Silkalne kondukis nin al famaj ripozlokoj ĉe la Nigra Maro. Ni konatigis kun la malnova kaj moderna bulgara arkitekturo, naturbelajoj kaj ĉiutaga vivo. Tiamaniere niaj konoj pri frata Bulgario kaj ĝiaj homoj denove plivastigis.

S. Neillande

En Aŭstria Esperanto-Revuo (n-ro 3/1974) ni legis la sekvan informon:

La aŭstria federacia prezidanto d-ro Rudolf Kirchshlāger deklaris sin por Esperanto!

Li skribis jene al s-ano Fritz Mosek, afergvidanta estro de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista:

„Mi al ĉiuj deziroj de la socialistaj esperantistoj rilatas tre favore; mi konsideras valora ĉion, kio utilas al la interkomprenemo de la popoloj. Kaj Esperanto tion faras!“

„Nuda inter lupoj“ elĉerpita

Okazis la sufiĉe malofta aŭ post la milito eĉ unika fenomeno en la internacia esperantista libromarkato, ke libro kun sufiĉe alta eldonkvanto (8000) kaj kun meza prezo (12 markoj de GDR, 12 guldenoj ktp) post nur 8 monatoj (marto-novembro 1974) ĉe la eldonejo elĉerpiĝis. Kaj tio okazis, kvankam nur malmultaj gazetoj ĝis tiam recenzis la romanon.

Tiu ĉi fakto montras, ke intensiva propogando kaj bone preparita internacia amasa mendado de furora libro certigas sukceson neatenditan eĉ de plej spertaj esperantistaj eldonspecialistoj. Sole 5000—6000 estis venditaj en Sovetunio kaj GDR. La eldonejo „Edition Leipzig“ post tiu granda sukceso konsideras eventuale aperigi alian germanan romanon en E-traduko.

„BASETA MALOLDULO TRISTIS DUM HUMIDA PRIMAVERO“

La esperantistoj estas multnacia popolo, kiun komunigas la lingvo Esperanto. Pro tio estas tute komprenebla la zorgo de la esperantistaro pri la sorto de nia lingvo, pri ĝia pureco, pri la vojoj de ĝia evoluo.

Ĉi-somere en SEJT¹ — 16 preskaŭ ĉiuvespere kolektigis aretoj da diskutantoj, inter kiuj ofte aŭdigis la voĉo de la aŭtoro de tiuj ĉi linioj. Ni disputadis arde, sed la diskutoj finiĝis plejparte per nenio. La diskutantaro skismis je du partoj — konservativuloj kaj „pliboniguloj“.

La pli ardaj el la „pliboniguloj“ asertis: „Ju pli multe da vortradikoj akceptos Esperanto el aliaj lingvoj, des pli bone!“ Iuj el ili tuj konstruadis novajn vortojn, senprokraste „pliriĉigadis“ Esperanton. Nur la nokta malmumo kaj la ludoj apud la ĝojfajro ĉesigis la diskutojn.

Sed en la mallumo de la tendo mi eĉ en duondormo kvazaŭ aŭdis la proponojn de la „pliboniguloj“: „Mi goŭos al ŝopo por baji bredon“ kaj „Mi geos al ladeno por kaŭfi broton“ (angligita kaj germanigita frazo, sig-

TIO ESTAS TRE KORTUŜA POR TIUJ, KIUJ VENAS EL USONO

de usona pediatro Benjamin Spock

Mi amas la infanojn de Vjetnamio. Mi observis ilin tuj post mia alveno ĉi tien, kaj ankaŭ ili observis min. Kien ajn mi iris, ĉu en iun vilaĝon, ĉu en Hanojon, la infanoj amasiĝas ĉirkaŭ mi. Post kiam mi amikece premis la manojn de la plej kuraĝaj, tiuj, kiuj estas pli timemaj, unu post la alia decidis paŝi antaŭen por premi al mi la manon. Ili ĉiuj estas allogaj infanoj ne nur pro sia amika sinteno, sed ankaŭ pro sia bona sano, pro

siaj nigraj okuloj kaj ankaŭ pro siaj ĝentileco kaj reciproka amo. Mia edzino kaj mi, ni tre miris vidi kiom malmulte la ĉi tieaj infanoj kverelas unu kun la alia, kiom ili ŝajnas havi kooperan spiriton, kaj kiom ĝentile infano prizorgas sian pli junan fraton aŭ fratino. Tio estas tre kortuŝa por tiuj, kiuj venas el Usono, kie oni ĉiam pretas vidi infanojn multe pli kverelemaj kaj malmulte emajn kunlabori inter si.

Mi ne pensas, ke mi povus diri al la vjetnamoj fari ion pli bonan por siaj infanoj; mi pensas, ke estas ĝuste la vjetnamoj, kiuj devas diri al mi, kiajn sugestojn mi povus doni al la usonaj gepatroj por la edukado de siaj infanoj, por ke tiuj ĉi fariĝu tiel mildaj kaj tiel plenaj de kooperada spirito kiel la vjetnamaj infanoj.

Mi estas konsternita pro la pruvoj pri brutalaj bombadoj fare de la US-aerfortoj. Antaŭe mi sciis tion el la informoj, sed la vortoj ne donas plenan impreson pri la detrua karaktero kaj pri la sovaĝeco de la atakoj. Estas terure vidi propraokule tutajn urbojn elrazitaj; estas terure vidi lernejojn senhezite atakitaj, templojn kaj pagodojn senhezite atakitaj, hospitalojn — kiel la hospitalon Bach Mai — senhezite atakitaj kaj ebenigitaj.

Aliflanke, mi esfas profunde impresita pro la energio, la vigleca laboro, la decidemo kaj la gajeco de la vjetnama popolo en la materia rekonstruado de la lando. Estas eksterordinare, ke tiom multe da konstruaĵoj stariĝis dum tempo tiel mallonga.

El „Informilo el Vjetnamio“, 1—2/1974



nifanta: „Mi iros al vendejo por aĉeti panon“).

Mi ektermis kaj rekonsciiginte konsolis min per tio, ke la frazo, titolanta mian artikolon, konstruita el PIV-aj² vortoj, estas same sovaĝa kaj fremda al Esperanto.

Ni rememoru, kiel komenciĝis tiu ĉi tragedio. Antaŭe aperis „malmaluloj“, kiuj subite ekdeziris ekstermi el Esperanto la bonegan prefikson „mal“ kaj enigis la abomenajn „febla“, „tarda“, „lanta“, „turpa“, „kurta“ ktp. Tiaj „kurtaj“ (mallongaj) aĉaĵoj estis kvazaŭ ponarda bato en la bruston de nia kara lingvo. De la unua rigardo povas ŝajni, ke la danĝero por la lingvo ne estas tro granda. „Temas ja pri enkonduko de 20—30 novaj radikoj“ — diras la „pliboniguoloj“. Tamen ni ne forgesu, ke Esperanto baziĝas je la logiko, kaj la komenciĝinta procezo ne povos finiĝi. Oni volonte imitos la malbonan ekzemplon. Estos enkondukataj kelkaj centoj da tiaj malmalaj vortoj. Se ni rimarkus, ke tiuj ĉi vortoj estas tre oftaj kaj pro tio nepre lernendaj, ni pensu, kio do restos de la plej grava kaj alloga eco de Esperanto — de ĝia facileco?!

Daŭrigante laŭ la sama logiko, la „pliboniguoloj“ daŭrigos sian aĉan aferon per ekstermo de aliaj prefiksoj kaj sufiksoj, kaj gaje kriaĉante: „Puŝu la falanton!“ finmortigos la Zamenhofan lingvon!

Tute pravis A. Vajtilavičius, kiu skribis, ke „la neologismoj estas kancero de Esperanto“!

„Haltu! — oni diros al mi. — Vi eble deziras bremsi la evoluon de la lingvo? La vivo antaŭenmarŝas, kaj pro tio necesas ŝanĝoj ankaŭ en la lingvo!“

Kion eblas respondi al tiaj bravuloj?

¹ SEJT — Soveta Esperantista Junulara Tendaro en 1974.

² PIV — Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto de G. Waringhien.

Mi povas nur proponi evoluigi iun nacian lingvon, kaj por ne tro longe serĉi — la rusan. Ili bonvolus same kuraĝe anstataŭigi la vorton „korova“ (bovino) per bone sonanta *ku* aŭ *kaŭ*, la mallongan *toj* uzi anstataŭ „igruška“ (ludilo) aŭ ion similan. Se tia kuraĝulo evitus frenezulejon aŭ piedbatojn kaj estus nur priridata, li povus sin nomi feliĉulo. Mi opinias, ke por tio kuraĝo mankas. Oni nur povas facilanime injekcii venenon, ĉar Esperanto dume ne havas sufiĉe da fortoj por kontraŭstari al Pliboniguoloj! Havu do kompaton al nia kara lingvo! Ĝi havis malfeliĉan junecon, oni kondamnis kaj persekutis ĝin. La mondo akceptos ĝin, se ni konservos ĝian facilecon. Ĉiu neologismo (senbezona nova vortradiko) kostos milojn da perditaj adeptoj, kiuj devas veni en niajn vicojn.

Ni tamen ne respondis al la rekta demando: „Ĉu Esperanto devas evolui?“

Tamen la vojo de la evoluo estas jam antaŭvidita kaj ĝi estas montrita al ni per la simplaj 16 reguloj de la „Fundamento“. Klaraj kaj precizaj, ili donas al ni eblecojn, pri kiuj la naciaj lingvoj eĉ revu ne povas. Pri la kvanto de la vortoj ni ankaŭ ne bezonas zorgi: ni ne uzas eĉ trionon de la vortoj, kiujn eblas konstrui laŭ la Fundamentaj reguloj.

Sur mia skribotablo kuŝas letero de mia kamarado. Ricevinte mian tradukon de unu rakonteto, li riproĉas min pro uzado de la vortoj „aŭtunis“ kaj „belegas“. Tiuj ĉi vortoj, skribas li, ne estas tradukeblaj en rusan, anglan, kaj germanan lingvojn. Eble! Tamen pri tradukoj en naciajn lingvojn zorgu la lingvistoj de tiuj lingvoj. Esperanto ne kulpas, ke ĝi estas pli esprimriĉa ol la naciaj lingvoj. Ni, nur ni kulpas, ke ni ne uzas plene Esperanton!

Krome ni memoru: Esperanto ne havas esceptojn! Plej grava, ora regulo: neniun lingvon en la mondo samas Esperanton tiurilate! Pro tio ni rajtas diri: „Li estas aktiva“ aŭ „Li aktivas“, „Mi

estas fieras“ aŭ „Mi fieras“, „Vi pravas“, „Ni kulpas“ ktp. — la vicon de ekzemploj eblas daŭrigi senĉese. Evidente, laŭ la logiko, ke ni rajtas principe formi verban formon el ĉiu vortradiko. Same kiel *malsanas, urĝas* rajtas ekzisti vortoj kiel *belas, bonas, bonhumoras, sinceras* ktp. Pro kio oni malpermesu tiujn ĉi formojn? Se iu deziras fari tion, li bonvolu: 1) Forstrekigi el la „Fundamento“ la menciitan regulon pri esceptoj; 2) Precize listigi la verbigeblajn vortradikojn de Esperanto.

Certe, la samon eblas ripeti pri konstruo de adjektivaj kaj aliaj formoj de ĉiu radiko. Mi aŭdas oponojn: bonvolu traduki iulingven „libras“ aŭ „paseras“. . . . Mi povas nur respondi, ke neniu lingvo povas esti modelo por Esperanto. Ĉiu nacia lingvo havas milojn da rigidaj formoj, kiujn necesas lerni parkere. Nia juna lingvo donas al ni rajton libere kaj kuraĝe krei novajn formojn. Sed laŭ la reguloj de la „Fundamento“! Mi kredas, ke la estonta homaro, parolanta kaj pensanta Esperante, sentos kaj uzos Esperanton duoble kaj trioble pli plene ol ni. Tamen ankaŭ por iliaj posteuloj restos „rezervo de stabileco“ el kiu ili ĉerpos novajn, freŝajn formojn. Ni ne kulpigu Esperanton, ni mem kulpas, ke ni tro ŝpareme kaj timeme uzas ĝian riĉegan fonton!

Noto de la Redakcio. K-do Gercikov starigas tre gravajn problemojn pri nia lingvo kaj ĝia evoluo. Ni aperigas lian artikolon kiel diskutindan petante ankaŭ aliajn samideanojn diri opinion pri la starigitaj problemoj.

IUJ METODIKAJ DEMANDOJ DE LA E-INSTRUADO

de *Violin Oljanov*

(Daŭrigo el № 1)

Elektado de lernolibro

Pri la lernolibro gravas la samaj premisoj kiel pri la metodo. Akcepti tiun aŭ alian lernolibron ankaŭ dependas de la aĝo kaj de la ceteraj karakterizaĵoj de la kursanoj, de la inklino kaj la sperto de la instruisto, de la

Mi volas konkludi. La vivo marŝas antaŭen. La lingvo devas evolui. Tamen ĝi evoluu laŭ la reguloj de la Zamenhofa „Fundamento“. Kontraŭ fikreuloj, intencantaj enkonduki en Esperanton fremdajn vortradikojn, ni devas batali tre arde! Arde kaj senkompate!

Mi povas nur ripeti la saĝajn kaj utilegajn proponojn de A. Vajtilavičius:

1. Ne agnoski, sed bojkoti la fikreulojn de malmaluloj, similajn al la vortoj en la titolo de tiu ĉi artikolo;

2. Bojkoti (ne abonigi) E-revuojn, kiuj amase uzadas tiujn aĉaĵojn;

3. Perletere esprimi al tiuj ĉi redakcioj indignon pri la malpurigo de Esperanto;

4. Proponi al la Akademio de Esperanto oficiale forigi kaj malpermesi uzadon de senbezonaĵoj centprocentaj sinonimoj.

Pereis Ido, mortis ĝiaj idoj, kiel Occidental, Novial, Interlingua kaj aliaj efemeraj lingvetoj. Sed vivos kaj prosperos Esperanto — pura, fundamenta! Mi kredas, ke baldaŭ ĉesos la „infana malsano de la maldekstreco“, kaj ni feliĉe forgesos pri mornoj, lantoj, oldoj kaj pri similaj aĉaĵoj.

La neologismoj — tiu malbenita serpento, povas mortigi la esperon, ke nia kara Esperanto venkos kaj prosperos.

*Grigorij Gercikov,
Talgat, USSR*

aplikata metodo. Kiam ne estas harmonio inter la metodo de la lernolibro kaj de la lektoro, la lecionoj lamas, la instruisto ĉiam sentas ian bremson. Plej malbone estas, kiam ankaŭ la lernantoj eksentas tion. Kompreneble, la lernolibro estas nur helpilo kaj la lek-



toro devas ĝin subigi al siaj celoj; li devas ĝin utiligi konforme al sia metodo. La lektoro ne estas devigata strikte sekvi la ordon de la lecionoj, nek utiligi ĉiujn lecionojn, nek ĝuste en la sama formo. Ĉiam la influo de la lernolibro estas tre granda, ĝi ĉiam tiras al si.

Bedaŭrinde, en nia lando mankas lerniloj en sufiĉa kvanto kaj sortimento kaj la E-instruistoj ne povas elekti — ili simple prenas tiun, kiu estas aĉetebla en la momento. Ni ne parolu pri lerniloj por daŭrigaj kaj perfektigaj kursoj.

En tiuj cirkonstancoj la lektoroj, kiuj scipovas instrui sen lernolibro, estas en privilegia situacio. Sed la senlibra instruado ne estas nur necesa alternativo — kiam mankas taŭgaj lernolibroj. Ĝi havas multajn avantaĝojn.

La plej grava el ili estas tio, ke la lektoro estas sendependa — li libere sekvas sian metodon, laŭ siaj komprenoj, laŭ sia plano. La manko de lernolibro igas la lernantojn pli atentaj en la klaso, la lektoro estiĝas fokuso dum la leciono. Kontraŭe: kiam unu lernanto legas en la lernolibro, multaj ne atentigas, ili interparolas aŭ eĉ okupiĝas pri aliaj flankaj aferoj. La manko de lernolibro plifirmigas la disciplinon — forestoj estas pli maloftaj, ĉar oni scias, ke malestas aliaj fontoj por ellerno de la materialo krom la leciono mem. La lecionoj sen lernolibro evitas la monotonecon de legado, estas pli variaj, pli viglaj. Dum ili la lernantoj partoprenas pli aktive kaj kun pli granda atento.

La gepatra lingvo

La moderna metodologio ne rekomendas uzon de la gepatra lingvo pro du ĉefaj konsideroj. Kiam la instruisto malkovras novajn vortojn, esprimojn aŭ gramatikajn regulojn ne uzante la gepatran lingvon, la atento streĉiĝas maksimume, kaj se la ekzemploj estas

impresaj, la lernantoj ilin fikse memoras kaj tiamaniere memoras ankaŭ la instruitan materialon.

La dua konsidero estas, ke la lernantoj kutimiĝas pensi en Esperanto. Ili ne konstruas la E-frazon per la bulgara frazo aŭ per tiu de iu ajn alia lingvo. Pro tio ili parolas kaj skribas korekte, neinfluate de la nacia gepatra lingvo.

Pro la samaj konsideroj ne estas necesa ankaŭ tradukado, precipe en la komenca kurso. La instruisto povus tradukigi apartajn frazojn, esprimojn aŭ vortojn nur escepte, de tempo al tempo, por kontrolo, kiam li dubas, ĉu la lernantoj bone komprenas.

La lernantoj precipe en la komencaj studhoroj tre persiste volas aŭdi la tradukon de ĉiu vorto en la gepatran lingvon, eĉ kiam ili komprenas ĝin (por ĉiu okazo!). Dependas de la firmeco de la kursgvidanto, ĉu li estos venkita aŭ venkinta. Kompreneble, dependas ankaŭ de lia sperteco. Ju pli malsperta li estas, des pli ofte li havus bezonon voki por helpo la gepatran lingvon.

Teni la atenton

Tio estas tre grava kondiĉo por la bona sukceso de la kurso. Ofte ni povas aŭdi dirojn de lektoroj kiel „mi petas, atentu“ aŭ eĉ ne tiel ĝentilaj, kun sufiĉe severa tono. Tio jam estas premiso kaj signo por malsukceso. Efektive, estas arto subteni la atenton ofte dum unu horo kaj duono (ĉar oni kunigas ordinare du horojn en la kursoj, organizataj de la societoj). En tiaj okazoj estus bone en la mezo de la leciono fari kontrolon de la ĉeestantoj, redoni la hejmajn laborojn, fari sciigojn aŭ doni la parolon al la kursanoj por diversaj demandoj. Tia ŝanĝo en la mezo ripozigas la lernantojn. Sed ĝi estas tute nesufiĉa. La tuta maniero de organizo de la instruhoro devas esti tia, ke oni ne bezonu postuli atenton.

Unuan rolon tiurilate ludas la voĉo de la lektoro, kiu devas domini en la klasĉambro kaj respektigi per sia klareco, melodieco, bona prononcado kaj varieco de la tonnuancoj. Tiuj kvalitoj ne kaŭzas laciĝon. Tre grava, kompreneble, estas la enhavo de la leciono. Ĝi devas esti bonhumora: la spritaĵoj abundu en la klarigoj. Ili ne nur vigligas la lernantojn, ili helpas ankaŭ al la memoro. La anekdotoj devas esti konstantaj akompanantoj de la lecionoj, de la gramatikaj reguloj, de la novaj vortoj. Ili kune kun la ŝercoj subtenas bonan humoron en la klasĉambro, konstantan viklecon kaj plezuron. Tiuj kvalitoj de la instruado estas grava faktoro por subteni bonan atenton, por forigi la laciĝon en la vesperaj horoj post labortago, kaj la lasta rezulto estas la bona sukceso de la kurso.

Por variigo de la kurso kontribuas, kompreneble, ankaŭ la kantado, deklamado, diversaj ludoj ktp. Ĉio ĉi devas esti racie dozita laŭ la aĝo, kulturo, pensmaniero de la aŭskultantoj. En tio la lektoro montros sian kapablecon, sian spertecon regi la atenton de la aŭditorio.

La preparo de la leciono

Tre grava por la sukceso estas la antaŭprepara laboro. Antaŭ la komenco de la kurso la lektoro devas distribui la tutan materialon pohore. La praktiko montris, ke la tri monatoj, dum kiuj ordinare oni gvidas kursojn, ne sufiĉas por trankvila, laŭsistema instruado de la materialo. La plej bona kaj fruktodona daŭro estas la kvarmonata por ĉiu grado. Estas jam tempo starigi en la tuta lando dusemestran instruaron — ekde la komenco de oktobro ĝis la fino de januaro kaj de la komenco de februaro ĝis la fino de majo. En ĉiu okazo la instruadoj ne devas esti malpli ol 60. Nur tiam oni povus kanti, deklami, havi sufiĉan tempon por ripetado de la lernita materialo, por ele-

menta konatigo kun la historio de la Movado kaj la organiza strukturo kaj stato de la Movado. Ĉio ĉi certigus la bonajn rezultojn.

La lektoro devas tre bone prepari ĉiun apartan lecionon. Unue li devas fari planon en la kadro de la materialo destinita por instruado laŭ la ĝenerala distribuo. Ordinare oni komencas per ripeto de la lernita materialo. La lektoro notas, kiujn elementojn li devas emfazi, kiajn demandojn li direktos, eĉ kiujn lernantojn li paroligos. Post tio estus bone diskutigi la hejman laboron, atentigante pri la tipaj eraroj.

Sekvas la punktoj de la nova materialo. Nepre devas esti markitaj ĉiuj nove instruitaj elementoj — gramatikaj kaj leksikaj, la maniero de prezento kaj ankaŭ la ekzemploj. Por ĉiu punkto de la lecionplano la lektoro devas plani la daŭrotempon, tiam estos certeco, ke la tempo sufiĉos por la destinita materialo; kaj dum la leciono oni devas kontroli la efektivigon laŭ tempo. La zorgo antaŭprepara laboro kaj detala plano certigas altgrade la sukceson de la leciono. Ofte la preplaboro okupas pli da tempo ol la daŭro de la leciono mem.

La Esperanto-instruisto — grava figuro en la Movado

La rolo de la E-instruisto ne elĉerpigas, kiel ĉe la instruistoj de la aliaj lingvoj, per la instruado de la lingva materialo. La kursgvidanto estas vera apostolo de la Movado. Li estas ĝia baza propagandanto kaj organizanto. Ja antaŭ ĉio de li dependas, ĉu la kursanoj membriĝas al la societo, ĉu ili restus en la Movado, ĉu ili estiĝus ties aktivaj agantoj. Tiucele jam en la komenco kaj en la daŭro de la kurso li devas inspiri al la kursanoj amon al la lingvo kaj la ideo pri internaciismo, interpopola frateco kaj paco, rakonti pri la praktika laboro de la esperantistoj por la realigo de tiuj idealoj. Lecionoj pri la Movado — pri ties his-



torio, literaturo kaj nuna stato — devas organike enplekti en la kursa materialo. Esperantaj kantoj, anekdotoj, deklamaĵoj, ekskursoj, partoprenoj en E-aranĝoj — ĉio ĉi devas esti nedisigebla parto de la kursa laboro de la lektoro. Ties devo estas ne nur instrui bone la lingvan materialon, sed ankaŭ eduki esperantistojn, aktivajn propagandantojn kaj organizantojn de la Movado.

Tiuj postuloj al la kursgvidanto faras lin centra figuro de nia Movado. De E-instruistoj dependos, ĉu la Movado supreniros aŭ stagnos. Konsidere al tio oni devas difini specialan rilaton al ĝi. Ne temas nur pri kontentiga kaj deca monrekompenco.

Tio ja estas unua devo de la E-so.

cietoj. Oni devas krei Esperantajn instruistojn-profesiulojn, kiuj koncentrigus sian tutan atenton kaj sciojn al tiu nobla agadkampo. Temas ankaŭ pri la spirita rilato, pri morala kuraĝigo kaj alta estimo al tiuj apostoloj de la E-movado, kio ne ĉiam estas rimarkebla. Ne malofte gvidantoj de societoj rigardas al la E-lektoroj nur kiel al plenumantoj de ilia volo, kiel al triagradaj agantoj.

Estas do necesa radikala ŝanĝo de la rilato al la E-instruado kaj ties efektivigantoj, sistemo de kuraĝigoj al la bonaj pedagogoj, avantaĝoj, kvalifikaj aranĝoj, seminarioj ktp. Tion postulas la stato de la bulgara E-movado, ĝiaj interesoj kaj perspektivoj.

Noto de la Redakcio

Tio estas la lasta parto de la artikolo de k-do Violin Oljanov „Iuj metodikaj demandoj de la E-instruado“, kiu aperis en „Bulgara Esperantisto“ sinsekve en n-roj 10—11, 12/1974 kaj 1, 2/1975. En la artikolo, kiel oni vidas, estas tuŝitaj interesaj kaj gravaj demandoj de la E-instruado. Estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj kamaradoj esprimu sian starpunkton pri la starigitaj demandoj. La Redakcio de nia organo volonte aperigos ankaŭ ilin

VERDAJ STELETOJ

LA MALNOVA AKVOMUELEJO

Fabelo de Elin Pelin

Kaŝanta sin en la arbara valeteto super la vilaĝo, movata de la akvo de profunda kanalo, kiu estis deflankigita de la riverego, la malgranda akvomuelejo funkciis senĉese kaj senlace cent kvindek jarojn. Kaj ĝi multe, multe maljuniĝis.

— Mi laboros ankoraŭ iom da tempo, — diradis la muelejo al la akvo, kiu movis ĝin. — Mi ankoraŭ havas fortojn.

Sed okazis tiel, ke post la morto de la lasta muelisto ne estis alia homo, kiu anstataŭigu lin. La akvomuelejo ĉesis labori kaj senhomiĝis.

Kiam la maljuna muelisto ankoraŭ estis viva, li ofte kondukis tien ĉi sian

malgrandan nepon Ivanĉjo, kaj la akvomuelejo aŭdis multfoje la avonparoli:

— Ivanĉjo, tiun ĉi muelejon mi lasos al vi. Se vi bone zorgos pri ĝi, ankaŭ ĝi zorgos pri vi kaj vivtenos vin.

Sed post la morto de la maljunulo Ivanĉjo ne venis. La muelejo atendis lin, sed li ne venis. Iom post iom ĝi perdis la esperon. Ĉirkaŭkreskita de herbaĉoj, ĝi klinis sian tegmenton kaj tute kadukiĝis. La malnova vojo, kiu kondukis al ĝi, estis surkreskita de dornoj kaj arbustoj kaj neniu jam venadis tien. En la ruinoj multiĝis la noktuoj, granda kolubro ekloĝis sub la sojlo.

— Nu, — diradis la akvo de la kanalo, — kie estas via Ivanĉjo? Vi jam nenion valoras, kaj mi soifas laboron. Mi havas fortojn, sed ili perdiĝas vane.

Kraketis pro doloro la akvomuelejo. Dum pluva vetero ĝi tiel malĝojegis, ke ĝi parolis larme.

Iun tagon, iun belan printempan tagon la akvomuelejo aŭdis proksime hompaŝojn kaj homparolojn.

„Ho, verŝajne Ivanĉjo venas“, — ĝi ekĝojis.

Kaj jen laŭ la vojo, surkreskita de herbaĉoj, venis triope homoj. Ilin kondukis junulo.

„Similas al Ivanĉjo, — ekpensis la akvomuelejo. — He, kiom li elkreskis! Kaj mi pensis, ke li ankoraŭ estas knabeto! Ho, dio mia, estus bonege, se li min iomete renovigus por labori ankoraŭ kelkan tempon!“

Jes, la muelejo ne trompis sin. La junulo estis Ivanĉjo. Li haltis antaŭ ĝi kun la tri pli aĝaj homoj kaj diris:

— Jen ĉi tie. Tiu ĉi akvomuelejo jam finvivis sian vivon, kaj sur ĝia loko oni povas konstrui bonegan akvo-centralon.

Aŭdinte tion la akvo laŭte ekbruis kaj diris al la muelejo:

— Aŭdu, maljunulino, por mi denove estas laboro. Mi jam laborigos elektrocentralon, ĉu vi komprenas? Tiun ĉi lokon lumigos elektraj sunoj, kaj la lumo, kiun mi produktos, ekbrilos tie, malsupre tra la kamparo, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, kiujn ni vidas de ĉi tie. Ivanĉjo ne estas kiel sia avo — por okupiĝi pri vi. Li pensas alimaniere.

— Ve, aliaj tempoj jam venis, — ekĝemis la akvomuelejo. — Ne eblas ion ajn fari. Mi forpasas. Mi plenumis mian devon kaj ne plu mi bedaŭras, ke mi malaperos, se je mia loko eklumos novaj sunoj.

El bulgara: Eugeni Vasilev

Dependas

Instruisto: — Petro, kiom aĝa estas persono naskita en 1927-a jaro?

Petro: Dependas de tio, ĉu la persono estas viro aŭ virino. . .

Travidebla objekto

La instruisto: — Petro, kion signifas travidebla objekto?

Petro: — Tio estas objekto, tra kiu oni povas vidi.

La instruisto: — Mi petas, donu ekzemplon.

Petro: — La serurtruo.

Korektu jenajn erarojn en № 12/1974

Paĝo 2, linio 9 de malsupre devas esti „Ĉe la kapitalismo kaj faŝismo . . .“

paĝo 11, linio 27 de supre, devas esti: „ekskursoj al: Coburg, Bamberg — revo! — ktp. linio 29 devas esti: . . . skulptaĵoj; la baziliko de

Skribu leteron aŭ poŝtkarton al *Radio Budapest, 1800 Budapest, Brody Sandor u. 5-7*, petante regulajn programojn en Esperanto. Bonvolu reskribi, se vi jam skribis! Nur amaso da eksterlandaj insistoj povas konvinki grandan radiostacion. Jen ni havas bonan eblecon gajni pliajn disaŭdigojn en Esperanto.

— Ne prokrastu! Skribu tuj!

deziras korespondi

Bulgario

Z. Zahariev — str. Klokotnica 26, *Haskovo* (pri filatelo, mono).

(Anglujo

Malcolm kaj Jan Wallace — 28 Rosendale Saveevnake Road *Chelmsford Essex* (pri literaturo kaj E-movado).

Ted kaj Alice Wood „The Bungalow“ Larks Lane, Broods Green, Gl Wallham *Chelmsford Essex* (komencantaj esperantistoj — per bk)

Andrew Archibald — 100 Zoover Anchov Street, *Chelmsford Essex* (16-jara — pri ĉt).

Ĉeĥoslovakio

Stepan Varvina — Riegrova ul. 375/5, 69 701, *Kyjov*, distrikto Hodonin (fraŭlo — kun bulgaraj gejuuloj).

Esperanto-klubo en urbo *Kyjov* serĉas korespondrilatojn kun E-klubo en Bulgario kaj precipe en Sofio. Ĝiaj membroj deziras korespondi individue por interŝanĝi spertojn, bk, pm, E-gazetojn kaj aliajn E-propagandilojn. Skribu al komuna sĉreso: 69 700 *Kyjov*, Esperanto-Klubo en la Domo de la Kulturo.

(Sekvas sur la kovrilpaĝo)



AL LA ARBARO!

Teksto: Ljuba Bojaĝieva

Muziko: Vojtach Heimlich

Alegro
mf Al la ar-ba-ro, al la her-ba-ro
kun la a-mi-koj el-i-ru!
Ti-e ku-ran-te ĝa-je kaj kan-te
tem-pon fe-li-ĉan pa-si-gu!
Fre-ŝa a-e-ro ĝis la ves-pe-ro per la ka-
res' vin ĝo-ĵi-gos! 1. 2. ĵi-gos.

Al la arbaro, al la herbaro
kun la amikoj eliru!
Tie kurante gaje kaj kante
tempon feliĉan pasigu!
Freŝa aero ĝis la vespero
per la kares' vin ĝojigos.

En la arbaro sur la herbaro
kun la amikoj vi ludu!
Tie ŝercante gaje kaj kante,
bonan humoron vi sentos.
La ruĝaj fragoj sub la kratagoj
nur formangadon atendas!

De la arbaro, de la herbaro
kun la amikoj reiru!
En la tornistroj kiel turistoj
fungojn bongustajn alportu!
Ridu elkore, kantu sonore,
pri l' amikeco rakontu!

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV,
Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN,
Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Korektis: M. Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Hispanio

M. Rafi Uruena de Hernandez — Avda Ramon y Cajal 12, 20 C. *Valladolid* (kun gebulgaroj — pri filatelo, cigaredetikedoj k. a.)

Hungario

Juhász Gabor — H-1113 *Budapest*, Bartok Bela ut. 124 (20-jara — kun bulgaraj knabinoj).

Pollando

Jendrika Marian — *Waclawow*, 26—246 Skotniki, pow. Opoczno (22-jara studento kun gebulgaroj pri teatro, arto, sporto, turismo, lingvoj, muziko).

Grazyna Zawadska — 58—140, Jaworzyna Sl., ul. Wolnosci 103, pow. Swidnica, woj. *Wroclaw* (18-jara — kun bulgaraj junuloj pri turismo, muziko, bk).

Malgrzata Kuck — 38—455 *Gliwienka* 238, pow. Krosno n/w, woj. Rzeszów (14-jara lernantino — kun bulgaraj gelernantoj).

Klubo „Esperanto“ przy P. U. P. I. K. „Ruch“, *Katowice*, ul. Gliwicka 142 — serĉas korespondantojn por siaj 200 membroj.

Esperanto-rondo ĉe PDK 59—900 *Zgorzelec*, str. Parkowa 1, woj. *Wroclaw* (junaj membroj — kun bulgaraj gejunuloj).

Grzegorz Scheffler — 59—900 *Zgorzelec*, str. Szimanowskiego 29 (sekretario de E-klubo — kun gebulgaroj).

Jozef Czerniecki — 48—100 *Glubczyce*, Debkyce, ul. Kościński 12 (kun bulgaroj — pri muziko, sporto, fotografio, geografio k. a.)

Larysa Kurczyk — 99—430 *Głowno*, Huta Józefów, bl. 5, m. 13 (18-jara — kun gebulgaroj).

Elza Skornik — *Ignica*, str. Roosevelta 39 m. 3 (oficistino — kun ĉi pri turismo, literaturo, mod-revuoj k. a.)

Ewa Góralczyk — 20—240 *Lublin*, ul. Hibnera 3/138 (18-jara lernantino — kun bulgaraj gejunuloj).

Esperanto-grupo ĉe liceo „Ludoviko Zamenhof“, str. Kruczek-wskiego 4, 95—236 *Lodz* (kun samaĝuloj el ĉi).

Sovetunio

Ilmar Palias — 200 016 *Tallinn*, Liiva 15, Estonio (16-jara, tutmonde pri sporto, fiŝkaptado, naturo, fotografio, pm, insignoj).

Margus Hein — 200 015 *Tallinn* Vabaduse pst. 165-c — 4. Estonio (15-jara lernanto — pm, bk, gram. diskoj).

Mikulskyte Virginija — 235 300 *Panevezys*, Aldonos 18-2, Litovio (15-jara lernantino — kun ĉi pri ĉi).

Aristarhov Sergej — 187 500, *Tihvin*, mikrorajon № 4, d. 3, ĉambro 204 (17-jara — kun ĉi pri ĉi)

Korespondu kolektive aŭ petu individuan korespondanton de:

Esperanto-rondeto, Miŝĉenko Sergej, Malinovskogo 4—49, *Zaporofje*, 330 059 (La rondanoj estas 16—17-jaraj mezlernejoj, dez. korespondi kun ĉi pri ĉi, interŝanĝas pm, bk, gram. diskojn k. a.).

Esperanto-Klubo „Lampiro“, Leningradskaja oblast, 187 500 *Tahnin*, mezlernejo № 5.

Konstantin Ĉerkasov — 403193, Volgogradskaja obl., Neĥaevskij rajon, *Verĥnereĉenskij*, otd N-ro 4 (17-jara — kun ĉi pri E-movado kaj E-literaturo, estrada muziko, bk, insignoj).

Strejnevskij Genadij — Sovĥoznaja 20—77. 330059 *Zaporofje* (16-jara — kun gejunuloj el ĉi).

Pokentelica Irina — Sovĥoznaja 28-A, kv. 60, 330059 *Zaporofje* (16-jara — kun gejunuloj el ĉi).

Miŝĉenko Sergej — Malinovskogo 4—49, 330059 *Zaporofje* (16-jara — kun gejunuloj el ĉi).

Junulara Klubo „Juneco“ dez. korespondi kun eksterlandaj kluboj pri diversaj temoj. Eblas ankaŭ individua korespondado. Adreso: 346423 Rostovskaja obl., *Novoĉerkassk* — 23, internat n-ro 33, klub „Junost“.

NIAJ MORTINTOJ

La 7-an de januaro 1975 nia Movado perdis sian aktivan membron

Grigor Jeljavski

Li naskiĝis en 1908 en v. Ŝijakovci, distr. de Sofio. Jeljavski sindone partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon. En la periodo de 1929—1934 Jeljavski aktive partoprenis en la laborista E-movado en Sofio, membrante en LEA. Pli ol 45 jarojn li dediĉis al Esperanto.

Post la liberiĝo de la lando longan tempon li estis kooperativa aganto.

● Je la 8 de februaro ĉ. j. forpasis en sia 68-jara aĝo la veterano de la E-movado en u. Pernik

Bojan Ĉavorski

Aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo, post la popola venko li partoprenis entuziasme la konstruadon de la nova vivo en nia Patrolando kiel instruisto, direktoro de fundamenta lernejo kaj sociaganto.

B. Ĉavorski longtempe laboris kiel sekretario de la Distrikta Komitato por Sobreco. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li estis sekretario de DK de Bulgara-Soveta Amikeco.

Esperantisto li fariĝis jam en sia juneco kiel gimnaziano en u. Radomir. Pli ol 45 jarojn li dediĉis al Esperanto. Li estis prezidanto de E-Societo „Nova Vojo“ en Pernik kaj lastatempe — sekretario de la Distrikta E-komitato.